

Malfermita letero de Katalin Kovats al la partoprenintoj de la Aŭstralia Kongreso 2020.


Estimataj,

Multaj el vi sekvis mian prelegon pri la *gravaj demandoj pri instruado de Esperanto*.

Pro la enketo, kiun mi farigis al vi komence, kaj pro kelkaj postprelegaj skribaj demandoj, mi sentas la bezonon resume skribi al vi. Bv. akcepti miajn postkongresajn vortojn.

Unue dankon al tiuj, kiuj plenigis la enketilon kaj mi petas pardonon de tiuj, kiuj ne sukcesis tion fari. Kvankam mi ne komprenas kial ne, sed tio ne plu gravas.

Jen sube kelkaj komentoj:





Mi instigas vin okazigi kaj trapasi la KER-ekzamenojn por kontribui al la oficiala agnoskigo de nia kara lingvo kaj ekhavi informojn pri via propra nivelo kaj pri la enhavo de la ekzamenoj.

Pliajn informojn vi trovas en la KER-paĝo kaj ties subpartoj: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker>

Statistikaĵojn pri la ekzamenoj vi povas legi ĉi tie:

<https://edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=kandidatoj>





Pli ol duono de la respondintoj ne aŭ apenaŭ instruas Esperanton.

Se ili interesiĝas pri demandoj rilate la instruadon, ili estas bonvenaj en la paĝaro <https://edukado.net/>

Se vi ne estas ankoraŭ sperta instruisto kaj volas gustumi, kion signifas instrui, eble aliĝu al nia *Ekparolu!*-programo, kie kiel *Onklo* aŭ *Onklino* vi povas helpi al komencintoj en ilia lernado pere de babiladoj. Tiu kontribuo povus esti bona komenco por vi por instrui kaj helpi.


<https://edukado.net/ekparolu>

Estis ĝojige legi, ke 12 personoj instruas Esperanton en lernejoj. Mi petas ilin registri siajn kursojn en la KURSEJO: <https://edukado.net/kursejo>



3) Kiel la redaktoro de edukado.net mi invitas vin malkovri la paĝaron. Ĝi havas multajn servojn, helpon kaj por lernantoj kaj por intruantoj. <https://edukado.net/>

4)




El la supraj respondoj mi konstatis, ke multaj el vi kreas kaj uzas proprajn materialojn por la instruado. Tio estas bona novaĵo. Se vi pretus dividi kun ni viajn kreaĵojn, bv sendi ilin, ni redaktos, kontrolos kaj aperigos ilin inter niaj instrumaterialoj: <https://edukado.net/instrumaterialoj>

Kiel kontribuinto vi poste ĉiam rajtos uzi la ekzercojn de la aliaj. Nia kolekto nombras pli ol 800 uzpretajn materialojn, kaj bona serĉilo helpas al vi trovi tion, kion vi bezonas.

Uzi materialojn el tiu kolekto garantias bonkvalitajn kaj interesajn materialojn kaj ŝparigos al vi multe da tempo.

5) Por la pretigata *Malibro* mi nuntempe detale analizis kelkajn apojn, kiujn oni uzas por lingvolernado. En via enketilo mi ne listigis ĉiujn, sed mi volis scii ĉu vi entute konas kelkajn.



Ŝajne la aplikaĵoj ne estas tre konataj, kaj vi povas argumenti, ke vi ne bezonas ilin. En tiuj okazoj pensu ĉiam pri tio, ke viajn lernantojn povas interesi aplikaĵoj, kiuj helpas ilin parkerigi vortojn, esprimojn, kiuj havas ludajn formojn.

Se vi plenigos mian (alian) enketilon pri la lernokutimoj, vi baldaŭ povos ricevi mian koncernan artikolon, en kiu mi prezentas detale tiujn aplikaĵojn kaj vi facile povas decidi kiujn el ili valoras elprovi.

Jen la enketilo, kiu ankoraŭ vivas dum du semajnoj:

https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSdtWz2L5iBgYC1ak8HMqvKgeuFbIMapZFXQwIKXIkEdhGUX6w/viewform?usp=sf_link



Oni ofte demandas min, *kiujn lernolibrojn uzi dum kursoj aŭ privataj lecionoj*. Al tiu demando ne estas ununura bona respondo. La elektota lernolibro dependas de dekoj da faktoroj, inter ili de la instruanto, de la lernantoj, kondiĉoj, celoj, niveloj, metodo, ofteco de lecionoj ktp.

Vi povas peti helpon de mi por via elekto, sed tiuokze priskribu la aktualan situacion kaj viajn bezonojn. Por oficiala lerneja instruado ni forte rekomendas la libron de Jozias Barboza. Ĝi ne estas perfekta, sed la plej bona el la disponeblaj lerniloj por lernantoj kun aĝo inter 10-14., eventuale eĉ por pli altaj klasoj. En la nova *Manlibro* vi trovos tutan tabelon kaj taksadon pri la de ni proponataj lernolibroj. Do, bv. iom ankoraŭ pacienci.


Pri la listigitaj libroj tamen vi povas legi pli detale en nia katalogo. <https://edukado.net/biblioteko/libroj>



7)

Estas bone, ke multaj el vi konas la prezentitajn lernilojn, kvankam *Pasporto* kaj *Mazi* apenaŭ aŭ nur tre malfacile alireblas legale.

Edukado.net ekde aŭtuno havos sekciojn por tiuj lerniloj, kune kun la filmoj, klarigoj, kurs- kaj lecionplanoj kaj ekzercoj. Ni kolektas tiujn informojn por ne lasi perdiĝi tiujn valorajn materialojn, kiujn neniun plu povas/volas prizorgi



8) Legi tre gravas por lernado de iu lingvo aŭ flegado de la lingvonivelo.

Mi volas instigi tiujn, kiuj ne legas sufiĉe, decidi ĉiutage legi iom, ĉu progresi en unu libro, ĉu rete konsulti diversajn materialojn, eventuale artikolojn de gazetoj ka ĵurnaloj.

Mi listigis en la enketo nur 3 ĵurnalojn, sed krome mi povus konsili al vi multajn aliajn.

Juna Amiko kaj *IPR* estis speciale en la listo pro instruantoj kaj lernantoj. *Monato* estas speciala ĉar ĝi enhavas artikolojn pri la mondo (vi povas ĝisdatigi vian vortprovizon) en Esperanto, sed ne pri la movado. Ne necesas legi ĉiam pri Esperantujo!

Se vi bezonas iom da instigo al legado, aliĝu al *Sumoo* kaj entreprenu legi en kelkaj periodoj jare elektitan nombron da paĝoj por venki vin mem kaj preni la kutimon legi . <http://www.esperanto-sumoo.pl/>


Kion konsili al niaj lernantoj?

Por komencintoj antaŭe oni ĉiam diris, ke necesas legi Gerda malaperis aŭ *Verda koro*.

Bonvolu ŝanĝi vian opinion kaj ekkoni la tri Katrina-librojn, kiuj estas legeblaj multe pli facile, kiuj signife malpli longas, enhavas laŭgradigitan vortostokon kaj ankaŭ la intrigo enplektas movadajn aferojn.

Tiu ĉi estas mallongigita ligilo, kie vi povas legi pri tiuj libroj: t.ly/mUy3

9)



Ankaŭ niajn orelojn necesas nutri per tekstoj, bonkvalitaj kaj interesaj, kiam ni lernas lingvon.

Se mi devus elekti unusolan fonton por tiaj materialoj, mi elektus *Esperanta Retradio*, kie ĉiutage vi povas aŭskulti interesajn artikolojn kaj samtempe legi la tekston.

La sono kaj lingvaĵo estas bonaj, la eblo lerni pri la mondo, estas senlima. Simple provu!

<https://esperantaretradio.blogspot.com/?view=flipcard#!>



Laŭ la nunaj planoj mi venos al Aŭstralio en januaro 2021 kaj povos okazigi seminarion por tiuj, kiuj deziras instrui aŭ volas akiri pli da spertoj kaj lerni pli da teknikoj.

Se vi volas pli profundajn kaj sistemajn studojn aŭ emas tuj starti en tiu formado, informiĝu pri la RITE-studoj, kiuj estas pagendaj, sed vere riĉaj kaj valoraj.

<https://edukado.net/klerigejo/rite/informoj>

aŭ ĉi tie: <https://edukado.net/klerigejo/rite/informoj>

Mi ricevis kelkajn demandojn mesaĝe:

- 1) Ĉu RITE estas por nur instruistoj, aŭ ĉu ankaŭ lernantoj de la aplikita lingvistiko kaj similaj fakoj rajtas partopreni?

Respondo: la studoj estas sendependaj de Poznan aŭ aliaj instancoj. La kurson mi mem kreis, mi funkciigas kaj la lokon, kiun mi konstruigis por ĝi propramane, mi disponigas ankaŭ por aliaj kursoj, senpagaj ene de edukado.net. Do, RITE estas sendependa de aliaj kursoj kaj instancoj.

2. *Vi menciis iomon pri la deviga lernado kaj finvenkismo ktp. Via opinio ŝajne malsamas al tiu de Penny Vos. Ĉu vi eble povas detaligi vian vidpunkton rilate al la enlernejo de Esperanto?*

Mi ne tute komprenas en kio mia opinio malsamas de tiu de Penny. Ankaŭ mi ŝatus se en multaj lernejoj Esperanto estus instruata, sed fare de fakuloj, personoj, kiuj bona regas la lingvon, kiuj povas bone utiligi ties propedeŭtikan valoron, bone konvinki la gepatrojn, instancojn kaj lernantojn pri la utilo de nia lingvo, ke ĝi povas doni multajn avantaĝojn, spertojn kaj ĝojojn, sed mi ne altrdus ĝin al ĉiu lernejo.

Mi ŝatus atingi, ke ne ni bezonu petegi la instancojn por ke ili enkonduku Esperanton, sed ili petu nin ke ni helpu en tio, ke ni disponigu materialojn, helpu trejni instruistojn ktp. Ni bezonas dekojn, centojn da bone funkciantaj lernoklasoj, bonan dokumentadon pri ili, argumentojn, rezultojn, pri kiuj oni povus legi, aŭdi, je kiuj oni povus esti ĵaluzaj kaj kiajn klasojn oni tre ŝatus havi.

Mi sopiras je situacio, kiam oni petegus nin malkaŝi niajn sekretojn, dividi nian trezoron. Mi ĝeniĝas pro tio, ke ni kvazaŭ almozpetas, kaj estas hontigitaj, humiligitaj, subtaksataj kaj pririditaj ĉar ni parolas Esperanton, ĉar ni volas instrui tiun lingvon. Do, unue necesas pruvi per profesia kaj bona, komuna laboro, ke ĝi jes ja estas trezoro.

3. *Vi menciis la interlingvistikon. Ĉu estas lokoj krom Poznan studi ĝin? Kaj laŭ vi, kiuj fakoj estas eble la plej promesoplenaj rilate al Esperanta edukado kaj ĝeneralaj Esperanto-rilataj studoj?*

Trijaraj postdiplomaj studoj pri esperantologio kaj interlingvistiko nun funkcias sole nur en Poznan, Pollando. Eble estos ankoraŭ nova (lasta?) grupo en la studjaro 2021-2023.

En kelkaj aliaj universitatoj de la mondo oni aŭ instruas Esperanton kiel lingvon, aŭ interlingvistikon aŭ esperantologion, kiel ĝeneralajn studobjektojn, sed la studentoj eĉ ne bezonas koni Esperanton por tio.

Serĉu kursojn en nia KURSEJO: <https://edukado.net/kursejo>

Jen la lasta novaĵo pri la sesio en Poznan: <https://edukado.net/novajhoj?id=799>

Jen la prezento de la kurso: <https://edukado.net/kursejo?kid=27160>

Jen la retejo de la universitato: <http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/index.html>

4. *Estas neniu ministrejo pri la Esperanta edukado. Mi volas scii, kiel tio helpus aŭ ne la edukadon de EO. Se ĝi ekzistus, ĉu tia ministrejo ne trudus iome alikulturajn/alistilajn rimedojn/mezurilojn krom la aprobitaj al instruitoj? Aŭ ĉu mi miskomprenas la celojn de tia ministrejo? Ĉu ĝi estus pli kiel centro kaj alcentrigilo por la plej bonaj rimedoj/metodoj kaj agadideoj kun helpmono ktp?*

Kompreneble sen ŝtato ne ekzistas ministerioj. Mi celis en figura senco diri, ke ni ne havas unu centran instancon, kiu disponigus al instruantoj, lernejoj, veraj naciaj ministerioj oficialajn programojn, planojn, dokumentojn pri instruado de Esperanto. Ne estas difinitaj la niveloj, normoj, kiuj povus helpi orientiĝi. Ni ne povas pruvi per dokumentitaj studoj, eksperimentoj nian veron.

La instanco indikus por kiu jaraĝo, por kiu lernonivelo kiuj lerniloj estas konsilataj, kiujn programojn oni sekvu, ktp. Eventuale ĝi eĉ verkigus ilin helpe de profesia temo, garantius ilian kvaliton.

Ne estas oficiala listo de trejnitaj kaj agnoskitaj instruistoj, do, ne eblas kontroli kiujn oni fidu (se temas pri oficiala dungado).

Momente ĉiu faras kion tiu opinias bona aŭ kion povas fari, kaj tia amatora kaj individua agado ne estas konvinka kaj ne montriĝas serioza por veraj edukinstancoj.

Mi opinias, ke mi tuŝis ĉion, kion vi demandis aŭ kion mi lasis vere malfermita.
Por pliaj klarigoj mi staras je via dispono aŭ ni renkontiĝu en januaro.

Fine

Mi invitas vin ludi la RISKO-ludon por trejni vin pri kulturo, lingvo kaj movado ĉiutage en 2-3 minutoj.

<https://edukado.net/ludoj/risko>



Amike salutas vin ĉiujn, Katalin Kovats, redaktoro de edukado.net
Diplomita instruisto, metodologo kaj esperantologo. ☺

Rete katalin.kovats@gmail.com
www.edukado.net